# BULTENO

## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 31 Februaro 1929

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

**La agado de la Internacia Labora Organizaĵo dum la jaro 1928. — Laborista sportasocio respondis en Esperanto al demandaro. — La okhora labortago en Eŭropa industrio. — La XIIa. kunsido de la Internacia Labora Konferenco. — Paĝo pri kooperado.**

### La agado de la Internacia Labora Organizaĵo dum la jaro 1928.

La Internacia Labora Organizaĵo daŭrigis kaj intensigis, dum la jaro 1928, siajn klopodojn por certigi la utilojn de internacia socia leĝfaro al la laboristoj de ĉiuj klasoj kaj por doni al sia agado pli kaj pli da universaleco.

La Kunsido de la Konferenco okazinta en Genève de la 30a de Majo al la 16a de Junio, prezidite de Dro. Carlo Saavedra Lamas, delegito de Argentino, kunvenigis la reprezentantojn de 46 Ŝtatoj, nombro kiu estis superita nur unufoje, en 1925. Brazilio, kvankam ne plu partoprenante en la laboroj de la Ligo de Nacioj, certigis sian deziron por kunlabori en la Internacia Labora Organizaĵo, sendante kompletan delegitaron. Turkujo, kvankam ne aliĝinte al la Organizaĵo, sendis observanton, kaj Ekvatoro faris same.

La vojaĝoj de la Direktoro helpis plifirmigi la rilatojn inter la Organizaĵo kaj pluraj Eŭropaj landoj, interalie Italujo kaj Hispanujo. La kunsido de la Administra Konsilantaro en Warszawa kaj Krakow en Oktobro, laŭ invito de la Pola Registaro, donis al Polujo la okazon por montri solene sian intereson pri la laboroj de la Organizaĵo.

La plej grandaj klopodoj tiaspecaj fariĝis tamen por la plibonigo de la rilatoj kun malproksimaj landoj. Post la vojaĝo de la Vicdirektoro en Sudafriko lastan vintron, venis, ĉi tiun vintron, la granda vojaĝo de la Direktoro en Ekstremoriento. La sama tendenco montriĝis en la malfermo de korespondejo por Hindujo en Delhi kej en la pli granda nombro da kompletaj delegitaroj de Sudamerikaj landoj.

La rilatoj kun la grandaj organizaĵoj de mastroj kaj laboristoj daŭre kreskis en 1928. La sindikatoj de oficistoj atestis ilian kontenton pri la enmeto en la tagordon de la Konferenco en 1929 de la demando pri laborhoroj de oficistoj. La unua kunveno de la Konsulta Komitato de Intelektaj Laboristoj okasis dum la jaro.

La konfirmado de internaciaj laboraj konvencioj multe plirapidis en la jaro 1928. Je la komenco de la jaro la nombro da konfirmoj registritaj estis 248. Je la fino ĝi estis 333. La nombro do plimultiĝis per 85. En 1927 okazis nur 33 konfirmoj kaj en 1926, 29.

Aktuale, la konvencioj ricevintaj la plej multe da konfirmoj estis: la Konvencio pri senlaboreco, konfirmita de 23 Ŝtatoj; la Konvencio pri nokta laboro de infanoj en industrio, konfirmita de 21 Ŝtatoj; la Konvencio pri la aĝo por allasi infanojn al mara laboro, konfirmita de 21 Ŝtatoj; la Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro surŝipe kiel hejtistojn kaj karbordigistojn konfirmita de 20 Ŝtatoj; la Konvencio pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj servantaj surŝipe, konfirmita de 20 Ŝtatoj; la Konvencio pri egaleco de traktado por naciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj, konfirmita de 20 Ŝtatoj; la Konvencio pri nokta laboro de virinoj, konfirmita de 19 Ŝtatoj.

Pri la aplikado de la konvencioj, la Komisiono de Spertuloj, starigita en 1926 por ekzameni la raportojn prezentitajn de la diversaj Ŝtatoj, laŭ la artikolo 408 de la Packontrakto, pri la aranĝoj faritaj por efektivigi la konvenciojn de ili konfirmitaj, tre efike funkciis.

Alia fundamenta demando estis larĝe diskutita dum la jaro, kaj en la Administra Konsilantaro, kaj en la Konferenco: la demando pri la revizio de konvencioj, kaj pri speciale pri la revizio de la okhora konvencio.

Ĉiu konvencio enhavas klaŭzon ordonantan, ke almenaŭ unu fojon ĉiudekjare la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo prezentos al la Konferenco raporton pri la apliko de la konvencio kaj decidos, ĉu oni devas enmeti en la tagordon de la Konferenco la demandon pri la revizio de la dirita konvencio. La Konsilantaro deziris starigi ĝeneralan proceduron por la plenumo de tiu klaŭzo. Ĉu tiu proceduro devas enteni la eblecon de revizio de la tuta konvencio ? Aŭ ĉu ĝi devas permesi, ke la Konsilantaro proponu al la Konferenco la revizion nur de kelkaj difinitaj artikoloj de la konvencio ? Per 18 voĉoj (ĉiuj Registaroj kaj ĉiuj laboristaj representantoj) kontraŭ 6 (ĉiuj mastraj reprezentantoj), la Konsilantaro akceptis proceduron permesantan la limigon de revizio al difinitaj punktoj.

Pri la Okhora Konvencio la Brita Registaro prezentis al la Administra Konsilantaro proponon celantan la enmeton en la tagordon de la Konferenco en 1929 de la demando pri la revizio de la Washingtona Konvencio. La Konsilantaro decidis pri tiu propono nur post kiam ĝi starigis ĝeneralan proceduron pri revizio por ĉiuj konvencioj. Difininte tiun proceduron, ĝi ekzamenis la Britan proponon kaj fine decidis komisii al la Direktoro, ke li preparu, pri ĉiuj konvencioj akceptitaj en Washington en 1919, la raportojn ordonitajn ĉiudekjare per la konvencioj mem kaj prezentu ilin al la Konsilantaro, kiam ili estos respektive kompletaj.

La Reprezentanto de la Brita Registaro deklaris en la Konferenco, ke lia Registaro restas fidela al la principoj de la Washingtona Konvencio kaj nur deziras difini pli precize tiujn principojn kaj tiel starigi la bazon por unuformeco de internacia agado. Eĉ post la Brita propono, novaj konfirmoj, kondiĉaj aŭ senkondiĉaj, de la Konvencio fariĝis. Kiel notis la Direktoro, parolante en la Konferenco, eĉ la kondiĉaj konfirmoj signifas, ke la Ŝtatoj farantaj ilin opinias, ke la Konvencio, laŭ ĝia aktuala formo, estas aplikebla kaj praktikebla.

La rezultatoj de la diskutoj de la Konferenco pri la d mandoj enmetitaj en la tagardon de la 11a kunsido estas jam bone konitaj de la legantoj de la Bulteno. La Konferenco akceptis projekton de konvencio pri metodoj por fiksi minimumajn salajrojn por iuj klasoj da laboristoj kaj rekomendon difinantan iujn ĝeneralajn principojn pri la fiksado de tiaj salajroj. Ĝi ankaŭ decidis, meti en la tagordon de la Kunsido en 1929 la demandojn pri la antaŭforigo de laborakcidentoj kaj pri la protekto kontraŭ laborakcidentoj de laboristoj okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj. La Konferenco ankaŭ akceptis gravan rezolucion pri la uzo de aŭtomataj jungiloj sur la fervojoj.

La Konferenco komisiis al la Administra Konsilantaro la ekzamenon de iuj proponoj pri la oficialaj lingvoj de la Organizaĵo. Okaze de tio, oni devus atentigi pri la sistemo de samtempa traduko per telefono, elpensita de S-ro Filene, de Bostono, Usono, pri kiu tre interesaj kaj sukcesaj eksperimentoj fariĝis en la Konferenco.

Dum la pasinta jaro la Internacia Laboroficejo daŭrigis senĉese siajn sciencajn laborojn, kiuj estas nepre necesa bazo por la leĝdona laboro de la Konferenco.

Laŭ peto de la Konsulta Komisiono de intelektaj laboristoj kaj kunlaboro kun la Internacia Instituto de Intelekta Kunlaboro, ĝi entreprenis vastan enketon pri senlaboreco ĉe la intelektuloj. Ĝi daŭrigis la studon pri laborkondiĉoj en kinematografaj establaĵoj. Ĝi eldonis la rezultatojn de enketo pri la kondiĉoj de vivo kaj laboro de ĵurnalistoj.

La Oficejo ankaŭ eldonis sian « Enketon pri la salajroj kaj la laborhoroj en la karbminejoj », kaj ĝi daŭrigas la enketon, pliampleksigante siajn esplorojn por pritrakti aliajn laborkondiĉojn en la karbminejoj: higieno, sendanĝereco, senlaboreco, k.t.p. Rezolucio de la Konferenco antaŭvidis similan enketon pri la teksindustrio.

La Oficejo eldonis dum la jaro volumon pri « La metodoj de statistiko pri loĝado » kaj aktuale faras novajn studojn pri loĝado en la Eŭropaj landoj.

Ĝi eldonis en 1928 du verkojn: unu pri « Deviga Asekuro kontraŭ Malsano » kaj unu pri « Nedeviga Asekuro kontraŭ Malsano ». Ĝi faras studon pri sociaj ŝarĝoj en la ĉefaj industriaj landoj de Eŭropo. Kune kun la Organizaĵo pri Higieno de la Ligo de Nacioj, ĝi studas la eblan kunlaboron inter la institucioj de socia higieno kaj la institutoj de asekuro. Ĝi jam eldonis volumon pri « la utiloj de la Germana malsanasekuro laŭ la vidpunkto de socio higieno ».

Ankaŭ aperis en 1928 du novaj volumoj pri « libereco por sindikatiĝi », la dua volumo de la « Internacia kolekto de juĝaj decidoj pri laboro » kaj la dua volumo de la serio pri la « Reguligo de migradoj ». La Oficejo ankaŭ preparas studon pri la migradoj dum la lastaj tri jaroj kaj ĝi okupiĝas pri la teknika preparado por konferenco kunvenonta je la fino de 1929, de statistikistoj pri migradoj.

La Administra Konsilantaro decidos, en sia sekvonta kunsido, pri la proponoj de la Konsulta Ekonomia Komitato de la Ligo de Nacioj, ke la Oficejo studu la sekvojn, kiujn la diversaj metodoj de industria raciigo povus havi por laborkondiĉoj (salajroj, laborhoroj senlaboreco, higieno, sendanĝereco, k.t.p.).

Pri agrikulturo, la Oficejo kompletigas du studojn petitajn de la Komuna Komitato starigita kune kun la Internacia Instituto de Agrikulturo. Unu rilatas al agrikultura teknika instruado kaj la alia al kooperado en agrikulturo. La Oficejo ankaŭ sin okupas pli kaj pli pri laborkontraktoj en agrikulturo kaj pri raciigo en agrikulturo kaj ĝiaj efikoj sur laborkondiĉoj.

La Oficejo jam komencis la revizion de sia studo, eldonita en 1924, pri laborkondiĉoj en Ruslando.

Memkompreneble, la preparado por la du kunsidoj de la Konferenco kunvenontaj en 1929, unu ĝenerala kaj unu speciala pri mara laboro, necesigis gravajn laborojn de dokumentado kaj esplorado pri la antaŭforigo de akcidentoj, la kondiĉoj de indiĝena laboro, la laborhoroj de oficistoj, senlaboreco, laborhoroj sur la ŝipoj, la protekto de maristoj okaze de malsano, la plibonigo de la vivkondiĉoj de maristoj dum ilia restado en havenurboj kaj la profesia kompetenteco de oficiroj de la komerca ŝiparo.

La Oficejo, dum la pasinta jaro, ankoraŭ plivastigis sian informilaron. Ĝia dokumenta servo nun recevas 3.500 ĵurnalojn kaj periodajn eldonaĵojn (500 pli ol antaŭ unu jaro). De la 1a de Januaro, al la fino de Decembro, 1928, sia biblioteko kreskis per 29.000 novaj verkoj. Ĝi ricevis 10.000 en 1923, 13.000 en 1924, 14.000 en 1925, 20.000 en 1926 kaj 24.000 en 1927. La jara kreskado do konstante progresas. Aktuale la Biblioteko de la Internacia Laboroficejo enhavas 230.000 librojn.

### Laborista Sportasocio respondis en Esperanto al demandaro de la Internacia Laboroficejo

La Esperantistoj jam scias, ke la Internacia Socialista Unuiĝo por korpa edukado kaj laborista sporto en sia kongreso en Helsinki decidis adopti Esperanton, kiel oficialan lingvon. Lastatempe, la Internacia Laboroficejo, por respondi al demando ricevita de korespondanto pri la sistemoj de korpa edukado aplikataj de laboristaj asocioj, sendis demandaron al la Internacia Unuiĝo, kiu resendis ĝin al siaj aliĝantaj societoj. Unu el ili, la Työväen Urheilulütto de Helsinki respondis al la Internacia Laboroficejo per tre klara kaj interesa informo skribita en Esperanto.

### La Okhora Labortago en Eŭropa Industrio

La Internacia Labor-Revuo ĵus finis la eldonadon de studo farita de la Internacia Laboroficejo pri la apliko de la principo de la okhora labortago en Eŭropa industrio.

Oni konstatas, ke ĝeneralaj leĝoj pri laborhoroj ekzistas en dudekunu Eŭropaj Ŝtatoj. Ses Ŝtatoj havas leĝojn nur pri parto de la laboristaro: Danujo, Estonio, Granda Britujo, Irlando, Luksemburgo kaj Svislando. Tamen, se oni konsideras ankaŭ la plivastiĝon de reguligo per kolektivaj kontraktoj, oni konstatas, ke nur tri Ŝtatoj havas neniun reguligon de laborhoroj, nome: du Ŝtatoj, en kiuj industrio ludas nur flankan rolon en la nacia ekonomio Hungarujo kaj Turkujo, kaj unu Ŝtato: Albanio, kiu posedas neniun industrian establaĵon.

Preskaŭ ĉiuj leĝoj kaj kolektivaj kontraktoj ordonas normalan laborsemajnon de 48 horoj aŭ eĉ malpli. El tiu regulo estas esceptitaj nur iuj laboroj submetataj al specialaj leĝoj, kiel la havenlaboristoj en Nederlando kaj la bakistoj en Grekujo, kaj la malgranda industrio en Sudslavujo. En Svislando la eflkaj kolektivaj kontraktoj malofte superas tiun limon.

Sufiĉe multaj landoj aplikas la « Anglan semajnon », kiu ne ĉiam malpliigas la daŭron de la semajna laboro, sed asekuras pli bonan ĉiusemajnan ripozon.

La distribuado de la laborhoroj laŭ periodo pli longa ol unu semajno okazas en pluraj landoj. Belgujo, kiu konfirmis la internacian okhoran konvencion, larĝe uzas tiun povon, prefere ol plimultigi la laborhorojn.

Por laboroj nepre kontinuaj, multaj Ŝtatoj adoptis la mezan laborsemajnon de 56 horoj. Aliaj, inkluzive Italio, Norvegujo kaj Nederlando, konservas la mezan 48 horan semajnon eĉ por tiuj laboroj. La sama regulo estas parte observata en Francujo. En Belgujo, laboristoj, laborantaj laŭvice 56 horojn mezonombre ĉiusemajne dum tri semajnoj, rajtas 26 tutajn tagojn da kompensa ripozo ĉiujare.

La kolektiva plenigo de horoj perditaj, ĝenerale pro kaŭzoj difinitaj, estas permesata de la Aŭstra, Franca, Germana, Hispana, Itala kaj Svisa leĝoj.

La ĉiutagaj plidaŭrigoj, permesataj ĉefe por preparaj aŭ kompletigaj laboroj, estas diversaj laŭ diversaj leĝoj, sed malofte superas du horojn. Krom tio, nedifinaj plidaŭrigoj estas ĝenerale permesataj okaze de akcidentoj aŭ *force majeure*. Limigita nombro da aldonaj horoj estas ankaŭ ĝenerale permesata okaze de neordinara pligrandigo de laboro.

Laŭ la leĝoj de la plimulto de la landoj, aldonaj laborhoroj devas esti pagata laŭ plialtigita takso. La minimuma ekstra takso varias de 25 al 50 por cento.

Fine la leĝoj de la plimulto de la Ŝtatoj enhavas rimedojn por asekuri la aplikon de la reguloj pri laborhoroj: ekzemple la starigon de horaro, kontrolon per laborinspektado, kaj sankciojn.

### La Komitato de Spertuloj pri Indiĝena Laboro

La dua kunsido de la Komitato de Spertuloj pri Indiĝena Laboro okazis en Genève de la 4a al la 8a de Decembro.

La Komitato, kiu estis starigita laŭ decido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo en 1926, kunvenis la unuan fojon en Julio 1927. Ĝi dediĉis la plej grandan parton de tiu kunsido al la diskuto de la demando pri deviga laboro kaj estis laŭ ĝia konsilo, ke la Administra Konsilantaro decidis meti ĉi tiun demandon en la tagordon de la Dekdua Kunsido de la Konferenco, kiu kunvenos en Majo 1929.

En la dua kunsido la Komitato daŭrigis la diskuton pri deviga laboro kaj detale ekzamenis la projekton de demandaro pri tiu temo preparitan de la Oficejo. La celo de la demandaro estas, esplori la eblecon de la akcepto de internacia konvencio limiganta kaj reguliganta la uzon de deviga laboro de indiĝenoj ĝis kiam tia laboro povus esti tute forigita, kio estas la vere dezirinda celo.

La Komitato ankaŭ konsideris la demandon pri « indentured labour », tio estas, laboro de indiĝenoj laŭ kontraktoj faritaj por longaj periodoj.

La spertuloj konsentiĝis pri pluraj principoj solvantaj la protekton de la libereco de la indiĝenoj kaj interalie pri la neceseco, ke la rekrutigo de laboristoj pere de Registaroj agentoj aŭ indiĝenaj ĉefoj por privataj mastroj estu malpermesata.

### La XIIa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco

La Internacia Laboroficejo sciigis al la Ŝtatmembroj de la Internacia Labora Organizaĵo la finajn decidojn de la Administra Konsilantaro pri la Dekdua Kunsido de la Internacia Labora Konferenco.

La kunsido malfermos en Genève la 30an de Majo 1929. La tagordo enhavos la jenajn temojn:

1. Antaŭforigo de laborakcidentoj (fina diskuto);
2. Protekto kontraŭ laborakcidentoj de laboristaj okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj (fina diskuto);
3. Deviga laboro de indiĝenoj (unua diskuto);
4. Laborhoroj de oficistoj (unua diskuto).

Oni memoras, ke la unuaj du demandoj trairis la unuan stadion de la duobla diskutado en la Dekunua Kunsido de la Konferenco en 1928, kiam la Konferenco decidis, meti tiujn demandojn en la tagordon de la Dekdua Kunsido, por dua diskutado kaj eventuala adopto de projektoj de konvencioj. Demandaroj pri tiuj temoj, laŭ decido de la sama Kunsido, estis senditaj al la Registaroj lastan Julion.

La demandoj pri deviga laboro kaj laborhoroj de oficistoj aperas la unuan fojon en la tagordo de la Konferenco kaj tial estos de diskutado celanta la preparon de demandaroj. La Internacia Laboroficejo redaktas raporton pri ĉiu el tiuj temoj, raporton rakontantan la leĝojn kaj praktikon en ĉiuj landoj kaj konkludantan per projekto de demandaro.

Krom tiuj kvar temoj, oni decidis, ke ĝenerala raporto pri senlaboreco estu prezentata al la Dekdua Kunsido. La Administra Konsilantaro opinias, ke estas necese, ekzameni la nunan situacion pri senlaboreco.

Oni ankaŭ scias, ke en Oktobro 1929 kunvenos la Dektria Kunsido de la Konferenco, kiu estos speciala kunsido por trakti demandojn pri mara laboro.

### Usono.

*Kredito por laborantoj.*

La jenaj informoj pri la evoluado de kreditunuiĝoj (credit unions) en Usono estas ĉerpitaj de artikolo verkita de Sro. Roy Nugent, de la « Russel Sage Foundation » kaj eldonita en la « Canadian Congress Journal », oficiala organo de la Kongreso de Metioj kaj Laboro (Trades and Labour Congress) de Kanado, en Februaro 1928.

La aŭtoro priskribas la diversajn specojn de institucioj, kiuj pruntedonas al laboristoj en bezono: popolaj bankoj, kompanioj por malgrandaj pruntoj, pruntistoj, kaj la salajraĉetistoj, kiuj maskas iliajn pruntojn sub la formo de aĉetoj de salajroj kun diskonto je 10 pro cento ĉiudusemajne aŭ 240 por cento ĉiujare.

La plej bona kaj plej malkara rimedo por tiaj pruntoj estas la kreditunuiĝo, per kiu, laŭ la leĝoj de 27 Ŝtatoj, la laboristoj grupiĝas por fariĝi siaj propraj pruntistoj.

La unuiĝo estas la banko de la laboristoj. Ĝi havas tri celojn: favori ŝparadon inter ĝiaj membroj, forigi procentegon kaj mizeron, pruntedonante por modera procento; eduki ĝiajn membrojn pri negocado kaj administrado.

La monrimedoj de la unuiĝo devenas de la vendo de akcioj kaj la akcepto de deponitaĵoj de ĝiaj membroj. Ĝi pagas ĝenerale de 6 al 8 por cento en dividendo sur ĝiaj akcioj kaj procenton je 4 aŭ 5 por cento por deponitaĵoj. La maksimuma procento por pruntoj estas kutime 1 por cento monate.

La petoj por pruntoj devas esprimi la celon de la prunto, kaj la petoj prezentitaj al diversaj unuiĝoj montras la servojn kiujn la kreditunuiĝo povas fari al siaj membroj. Jen iuj ekzemploj: $ 100 por sendi filon al lernejo; $ 150 por pagi impostojn; $ 2.000 por repagi prunton, por kies renovigo la komerca kreditkompanio postulis 20 por cento; $ 500 por pagi honorariojn de kuracisto; $ 1.000 por la komenca pago ĉe aĉeto de domo; $ 300 por transporti fraton de Germanujo al Usono; $ 500 por aĉeti meblaron.

En la Ŝtato Nova Jorko ekzistas 116 kreditunuiĝoj kaj lastan jaron ili pruntedonis $ 19.000.000.

La jena tabelo montras la rapidan kreskon de la movado en Usono:

| Jaro (1 Jan.) | Ŝtatoj kun leĝoj pri kreditunuiĝoj. | Nombro da unuiĝoj. | Membraro | Aktivo $ | Pruntoj al membroj. $ |
|---|---|---|---|---|---|
| 1910 | 2 | 2 | | | |
| 1915 | 6 | 48 | 7.642 | 471.000 | 624.000 |
| 1920 | 11 | 142 | 39.825 | 3.568.000 | 5.558.000 |
| 1925 | 18 | 257 | 130.724 | 21.165.000 | 29.742.000 |
| 1927 | 24 | 518 | 213.250 | 30.485.000 | 39.770.000 |

Kvankam la kreditunuiĝo estas esence laborista organizaĵo, la unuiĝoj organizitaj de laboristaj sindikatoj estas ankoraŭ la malplimulto, sed ĉiuj unuiĝoj starigitaj de sindikatoj havis grandan sukceson, kaj la sindikatoj pli kaj pli interesiĝas pri tiaj institucioj.

# PAĜO PRI KOOPERADO

### Finnlando: la kooperativaj laktejoj

*(fino)*

El la tuta kvanto da lakto, 77,7 % estis uzata por la fabriko de butero, 7,5 % por la fabriko de fromaĝo, 14,6 % estis vendita en la lando, kaj 0,2 % donita al servistoj kiel parto de salajro. La plimulto de la butero kaj fromaĝo estas eksportata.

Jen la kvantoj da butero kaj fromaĝo eksportitaj dum la lastaj jaroj:

| Jaro | Butero | Fromaĝo | Jaro | Butero | Fromaĝo |
|---|---|---|---|---|---|
| | Miloj da Kilogr. | | | Miloj da Kilogr. | |
| 1921 | 6 465 | 2.125 | 1925 | 13 191 | 3.820 |
| 1922 | 8.334 | 2.716 | 1926 | 13 212 | 2.887 |
| 1923 | 6 566 | 1.335 | 1927 | 15 066 | 2.949 |
| 1924 | 8 249 | 2.546 | | | |

La eksportado de butero en 1927 estis disdividita jene:

| | Miloj da Kg. |
|---|---|
| Granda Britujo | 10.399 |
| Germanujo | 4.208 |
| Danujo | 397 |
| Aliaj landoj | 61 |

La eksportado de fromaĝo en la sama jaro estis jene disdividita:

| | Miloj da Kg. |
|---|---|
| Germanujo | 1.783 |
| Usono | 537 |
| Danujo | 174 |
| Granda Britujo | 126 |
| Belgujo | 125 |
| Svedujo | 112 |

La spezo de la kooperativaj laktejoj, la meza spezo por laktejo kaj la valoro de la tuta eksportado de lakto-produktaĵoj, aperas en la jena tabelo:

| Jaro | Spezo | Meza spezo por laktejo | Tuta eksportado. |
|---|---|---|---|
| | Milionoj da markoj. | Miloj da markoj. | Milicnoj da markoj. |
| 1921 | 504,3 | 1.094 | 470,3 |
| 1922 | 513,8 | 1.059 | 504,6 |
| 1923 | 480,3 | 942 | 361,4 |
| 1924 | 597,9 | 1.079 | 544,6 |
| 1925 | 755,5 | 1.255 | 776,6 |
| 1926 | 778,4 | 1.207 | 653,7 |
| 1927 | | | 704,1 |

La kooperativaj laktejoj faris kaj faras grandajn kolopodojn por plibonigi la kvaliton de iliaj produktaĵoj. Tion ili faris per aĉeto de nova maŝinaro, edukado de laboristoj, konkursoj, k.t.p. Sed la plej efika agado estis la enkonduko de la Dana sistemo de pago por lakto laŭ kvalito. Antaŭe nur 40-50 % de la lakto estas unuaklasa. Esploradoj faritaj de 1924 al 1926 montris, ke 90,7 % de la lakto provizata al la kooperativaj laktejoj estis bona, kaj nur 9,3 % malpli bona. Preskaŭ ĉiom de la butero eksportata estas nun unuaklasa.

La Finnaj kooperativaj laktejoj starigis en 1905 kooperativan eksportasocion, la Centran Kooperativan Asocion por Butereksporto « Valio ». Ĉi tiu asocio depost longe monopoligas la eksportan merkaton kaj estas ankaŭ la plej granda entrepreno en la interna merkato. Por vendi siajn produktaĵojn en Granda Britujo ĝi starigis oficejon en Hull kaj agentejon en Glasgow. Ĉia ĉefestablaĵo estas en Helsinki, kaj ĝi havas eksportoficejon en Hanko, kaj filiojn en Turku, Wiipuri, Tampere kaj Oulu. En 1927, la Valio vendis 15.500.000 kilogramojn da butero, tio estas ĉirkaŭ 77 % de la tuta kvanto produktita de la kooperativaj laktejoj, kaj ĝia tuta spezo estis 650.000.000 Finnaj markoj, tio estas pli ol 80 % de la tuta spezo de la kooperativaj laktejoj.

### *La Centraj Kooperaj Organizaĵoj en 1927.*

Laŭ la monata Bulteno de la Banko de Finlando por Aprilo 1927, la tuta negocaro de la Finnaj centraj kooperaj organizaĵoj en 1927 kaj al du antaŭaj jaroj valoris jene, en milionoj da Finnaj markoj:

| | 1925 | 1926 | 1927 |
|---|---|---|---|
| Finna Pogranda Koopera Societo (S. O. K.) | 700,5 | 742,5 | 848,0 |
| Koopera Pogranda Asocio (O. T. K.) | 656,2 | 658,5 | 690,5 |
| Centra Koopera Butereksportado (« Valio ») | 604,4 | 584,1 | 656,8 |
| « Hankkija » Centra Koopera Societo por Agrikulturaj Provizoj | 219,1 | 278,1 | 310,5 |

La tuta negocaro de la tri centraj organizaĵoj en 1927 estis 2.505,8 milionoj da markoj, kontraŭ 2.263,2 milionoj en 1926 kaj 2,180,2 milionoj en 1925, kio signifas pligrandiĝon de 10,7 % en 1927, kontraŭ 3,8 % en 1926. La profitoj en 1927 estis 33,1 milionoj da markoj, kontraŭ 27,3 milionoj en 1926.

La Centra Banko por la kreditkooperativoj dum la lastaj tri jaroj, pruntedonis al tiuj societoj la jenajn sumojn: en 1927, 685 milionojn da markoj; en 1926, 492 milionojn, en 1925, 393,6 milionojn.

### Svedujo

### Novaj kooperativaj apartamentoj en Stockholm

La Kooperativo de Luantoj de Stockholm ĵus komencis la konstruadon de tri grandaj domoj, kostantaj ĉirkaŭ 7.000.000 kronor, enhavantaj 600 aŭ 700 apartamentojn, en diversaj partoj de Stockholm. Dank' al nova metodo de konstruado, la luprezoj por tiuj apartamentoj estos de 25 al 30 por cento malpli altaj ol la kutimaj prezoj en Stockholm, sed, malgraŭ tio, ili estas provizataj per unikaj modernaj komfortoj kaj teknikaj plibonigoj. Unu el ili estas novaspoca radiocentro por la komuna servo de ĉiuj okupantoj, kiuj devas nur funkciigi elektran kontaktilon en la muro, por aŭdi la radioprogramojn. La centro estas kunigita al akumulatoro kun aŭtomata aranĝo por reŝarĝo. La tuta instalado kostas ĉirkaŭ £ 50 kaj facile servas 100 apartamentojn.

La grandaj centraj kortoj de la konstruaĵoj konsistigas parkojn kaj ludejojn por la infanoj, kaj la societo eĉ provizas la okupantojn per kooperativaj vartistinoj. Nova aparato anstataŭas la batadon de tapiŝoj. Ĉiu apartamento kompreneble enhavas centran hejtadon, hejtan akvon kaj banejon. La kuirejoj estas tute modernaj kaj higienaj.

Ĉiu apartamento konsistas el du ĉambroj, unu el kiuj enhavas malgrandan kuirejon malantaŭ vitropordoj, banejo, vestiblo, provizejo kaj vestoŝranko, kaj la luprezo estas ĉirkaŭ 1.000 kronor.

La Societo, kiu ĉiam kreskas, nun loĝas ĉirkaŭ 12.000 personojn en siaj konstruaĵoj, kies valoro estas ĉirkaŭ 42.000.000 kronor.